



Numero 2024:23; junio 9.

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo de SMG: sen. Sume 300 KB

Ondo albordiĝis kun jenaj juniaj jubileoj

Tri elstaraj polaj esperantistoj (tradukisto Kazimierz Bein, aktorino Jadwiga Gibczyńska kaj radio-ĵurnalistino Barbara Pietrzak) estas en la listo de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj en junio 2024, kiun dum pluraj jaroj kompilas la ruslanda ĵurnalistoj kaj aŭtoroj Aleksander Korĵenkov. Krome, en la listo estas Nikola Aleksiev, Dalibor Brozović, Sylla Chaves, Robert Kreuz, Gonçalo Neves, Neil Salvesen kaj Pjotr Stojan. Legu pli en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĉe <https://sezonoj.ru/2024/06/junio-11/>

Pli ol kvincent aliĝoj por UK Aruŝa

Je la 0-a de junio 2024, ekzakte du monatojn antaŭ la komenco de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo (Tanzanio), al ĝi aliĝis 541 personoj el 62 landoj (Germanio 48, Francio 44, Burundo 43, Italio 30, Ĉinio 26, Koreio 27, Japanio 27, Usono 24, Pollando 17, Belgio 17, Tanzanio 16, Brazilo 16, Britio 13 kaj Hispanio 12).

Internacia renkontiĝo de la studentoj kaj instruistoj

La 16-an de majo okazis ret-renkontiĝo kun ukrainaj kaj eksterlandaj studentoj kaj instruistoj. La ideo estis interkonatigi la Eo-kursanojn el diversaj landoj kaj starigi amikajn kontaktojn. De la ukraina flanko estis ok studentoj de la fakoj pri tradukado kaj komputila lingvistiko en la Lesja Ukrainka Volinia nacia universitato, kiuj elektis tri-monatan kurson pri interlingvistiko kaj Eo (entute 20 gejunuloj), kaj du profesoroj: Nina Danylyuk kaj Oksana Rohach. Krome, aliĝis la membroj de la ukraina sekcio de ILEI Volodimir Soroka kaj Ihor Glagolevskij (la nuna prezidanto de UKrEA), kiuj informis pri sia instrua agado.

Ukrainaj studentoj-komencantoj prezentis la urbon Lucjk kaj la nacian universitaton kaj ĝian Eo-centron. Nina Danylyuk rakontis pri la instru-metodikaj materialoj de la kurso. Membroj de la Eo-retkurso (nivelo B1) el Serbio sub gvido de Radojica Petrović, Aranka Laslo k.a. instruistoj prezentis sin kaj rakontis pri la motivoj lerni Esperanton. Ekzemple, Danijela Petrović diris, ke la lingvo helpas vojaĝi kaj konatiĝi, post la IJK-2023 en Italio ŝi havas multajn amikojn. La gestudentoj el la Teherana Universitato venis al Esperanto danke al Ahmad Mamduhi, kiu ĉeestis la kunvenon. Esperanto kiel ponto-lingvo helpas studi aliajn lingvojn kaj kulturojn.

Severija Marija Banaitytė el Litovio informis pri la 80-a IJK de TEJO, kiu okazos en la pitoreska insulo Ŝventoji ekde la 18-a de aŭgusto kaj invitis gejunulojn partopreni ĝian riĉan programon. Ĉiuj deziris al ukrainoj finon de la milito kaj pacon. La kunveno utilis por la 22 partoprenantoj.

Nina Danylyuk, estro de ukraina sekcio de ILEI.

Pli da informoj pri la Greziljona somero

Ni jam raportis pri tio en EKO 20. La Oka Maratona Esperanto-kursaro kaj la 36-a Internacia Eo-Konferenco (OSIEK) okazos ekde la vendreda vespero, la 5-a de julio. Pri la cetera somera propono, legu:

Kursaro : <https://gresillon.org/maratona->

Aliĝo: <https://gresillon.org/aligho>

Tuta programo: <https://gresillon.org/agendo>

KURSOJ – aldonaj informoj

[Andrea Bertrand](#) (Francio): Kurso por komencantoj kaj komencintoj (A1-A2)

[Radojica Petrović](#) (Serbio): «Per perloj al astroj» (B1-B2)

[Koutny Ilona](#) (Poznano, Pollando): Leksika pliriĉigo kaj diskuto pri aktualaj temoj; Didaktiko de lingvo-instruado; Lingvo kaj kulturo (C1-C2)

AKTIVAĴOJ

Promenado en la parko por malkovri la lokan flaŭron kaj faŭnon *julio 06*. Turismaj vizitoj al: Apotekejo Baugé, Le Lude, Dolmeno Pontigné. Tuttage: kasteloj *julio 10*, Boule de Fort, ligno-pilkaj ludoj. Baugé *julio 14*; Artfajra spektaklo en Baugé *julio 14 22h*./Libroservo surloke, vidu la [liston](#)

LA SEMAJNO RESUME

[Ĝenerala disvolviĝo de restado](#) --- [Menuoj](#)

[Prezoj kaj aliĝilo](#) --- [Aliĝintoj kaj iliaj loĝlokoj](#)

[Foto de tiu ĉi staĝo](#) --- [Fotoalbumoj, filmetoj de pasintaj staĝoj](#) --- [Grupfotoj](#)

Opinioj de partoprenintoj [de tiu staĝo](#) kaj [de pasintaj staĝoj](#)

Denove, de BrazilMuzika Klubo

La kantistino **Ana Paula Pose** registris videon de la kanto *Vilaĝeto* (originale *Vilarejo*), famigita de grupo **Tribalistas** kaj esperantigita de **James Rezende Piton**:

Flavio Fonseca skribas al mi: “Pli foje, **Stefan MacGill**, mi dankas al vi pro via apogo al nia laboro (por ke ĝi ne ĉesu!)”. **SMG**: EKO ja volas kunlabori kun ĉiu ajn pozitiva forto en nia movado kaj parol-komunumo!



Balkana aktiveco

La maja kunveno de la kunlaborantoj de la labor-grupo Balkana Kunlaboro kunvenis per Zomo de la 18-a UTK. Ĉeestis reprezentantoj de Serbio, Hungario, Rumanio, Bosnio-Hercegovino kaj Albanio kaj diskutis pri la jenaj temoj:

- Utiligo de la programo *esperanto12*, reta versio de la konata lernolibro Zagreba Metodo, al kiu estus eble aldoni aliajn lingvojn de balkanaj landoj.
- La kongreso en Beogrado de LIBE kaj aldonaj kunvenantoj. Nedeljka Lozajic, Aranka Laslo kaj Radojica Petrović raportis pri la nuna situacio. AMO jam raportis pri tiu multfaceta evento.

En UK oni prelegos pri fervojoj

La prezidantino de IFEF, Rodica Todor, prezentis provizoran programon de la IFEF-kongreso en Slovakio, diskutota en retkunveno kun LKK. La prezidantino partoprenos la Ĝeneralan Asembleon de FISAIC ĉi-jare aŭtune en Sofio. Dum la UK en Aruŝo estos prezentitaj prelegoj pri eŭropaj grandrapidaj fervojoj, pri la historio de la fervojfaka vortaro kaj pri la nuna stato de fervojo en Afriko.

Raportis Ladislav Kovář en la IFEF-bulteno 2024-3

SMG: Mi aperigas mapon pri la fervojoj en Tanzanio, kiu aperis en tiu IFEF-bulteno. Ĝi montras, ke ja ekzistas fervojo de Dar-es-Salaam al Aruŝa. Tre eble tio estas etrela kaj malcerte ĉu estas pasaĝera servo. Tiu linio ne ĝuas la investadon de la projekto konstrui norm-larĝan fervojon de la marbordo ĝis Dodoma, la ĉefurbo de Tanzanio.



Informado en arta foiro en Togolando

En Togolando, informagadoj pri Esperanto plue okazas. Publikaj elpaŝoj okazos ĉirkaŭ la monato de Esperanto. Nia lingvo estos reprezentita, sub la aŭspicio de Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando (APETO), en la Tria Arta kaj Literatura Foiro de Lomeo. APET-anoj precipe deĵoros ĉe budo, montros librojn de togolandaj e-istoj, disdonos informilojn, parolos pri lingvaj rajtoj kaj Esperanto. Tion decidis kunveno de grupo, kiu aprobis proponojn por vigligo de la landa movado. La aktivaĵoj okazos de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2024 ĉe la esplanado de la publika kunvenejo en Lomeo. Temos pri konigo kaj valorigo de arto, kulturo kaj turismo ĉe la partoprenanta publiko. Tiu ĉi foiro donas eblon al artistoj, verkistoj, manlaboristoj, kantistoj, pentristoj komuniki pri siaj kreaĵoj kaj vidigi siajn verkaĵojn. La renkontiĝon organizas s-ino Sossou Séfako Amè Valérie, la dua vicurbestro de la municipo Golfe 2 interkonsente kun la enlandaj ministerioj respondecaj pri teknika edukado kaj metio kaj kulturo kaj moroj. La esperantistino Kossivi Messan Judith, diplomito de ESTBA, Altlernejo pri Biologiaj kaj Manĝaĵaj Teknikoj, renkontiĝis kun la

iniciatinto de la salono. Ili babilis ne nur pri Esperanto, produktado, literaturo, sed ankaŭ pri kunlaboro, nome ebla partnereca rilato kun APETO.

Koncizigita el raporto de Adjévi Adjé

Aminda radio aŭdigas sian voĉon

Jen la ELSEENDO n-ro 142_5_2024 de nia retradio Aminda Radio Esperanto el Malagasio. Ni invitas vin sekvi kelkajn novaĵojn de la kuranta monato, el kiuj estas grava arestado en Tajlando de kontrabandistoj pri indiĝenaj bestoj el Malagasio. Nia dua rubriko raportas al vi pri la ĉarma urbo Marovoajo en la nordo de la lando.

<https://youtu.be/gzxKsrIUoIl>

Henriél FIDILALAO, Madagaskaro

Nia ukraina landa asocio strebas al pliaj kontaktoj

La 31-an de majo 2024 en la Nacia Biblioteko de Ukrainio 'Jaroslav Mudrij', prezentiĝis hibrida konferenco okaze de la 35-a jariĝo de Ukrainia Esperanto-Asocio (UkrEA). La temo estis: 'Fondiĝo kaj evoluo de Ukrainia Esperanto-Asocio, ĝia integriĝo en eŭropajn kaj mondajn Esperanto-organizaĵojn'. La prelegantoj estis:

- Prof. Eŭheno Kovtonjuk, la unua prezidanto de UkrEA,
- Viktoro Pajuk, la dua prezidanto de UkrEA,
- D-rino, prof. Nina Daniluk, estrino de la ukraina filio de ILEI,
- D-ro, prof. Ihoro Galajĉuk, estro de la ukraina medicina filio de UMEA.

Kazaĥio proponas novan radiostacion

Nia faka asocio pri Komerco (IKEF) konigis novaĵon pri la nova radiostacio *Silka Vojo*, kiun ĵus ekfunkciigis la kazaĥa IKEF-ano Vyacheslav Nasretdinov.

Gratulon kaj sukceson al la radiostacio Silka Vojo - <https://volnarez.com/silka-vojo/bc>

Prezidanto de IKEF: Ĉielismo WANG Tianyi

Pozitiva recenzo: "Mi aŭskultis kelkajn kantojn kaj aliajn informojn. Ege inda radiostacio laŭ nomo kaj programeroj". Mian Salam SHANY, Pakistano

===== vortoj: 1415 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komuniko iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj

AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

La unuaj dudek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apertenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikaĵojn pere de retlisto.